

Lucien BOURGOIS

Redaktoro de "NORDA GAZETO"

laŭ la fluo de l'interparolo

Konversacia gvidlibro
Franca - Esperanta

Cercle espérantiste de l'Agenais

F 47340 Laroque Timbaut

1986 * 8 FF

Lucien BOURGOIS

Redaktoro de "NORDA GAZETO"

LAŬ LA FLUO DE L'INTERPAROLO

Konversacia gvidlibro
Franca - Esperanta

SAT-Broŝurservo
1986

*Ĉi tiun verkon mi dediĉas al mia mal-
nova kunlaboranto kaj amiko :
Fernand DITACROUTE.*

Mia unua verko, la "**Proverbaro Franca-Esperanta**", preskaŭ elĉerpiĝis. Pri ĝi mi ricevis favorajn recenzojn de Esperantaj gazetoj kaj eĉ gratulojn de nia elstara vortaristo Gaston WARINGHIEN. Tial, spite la malfacilajn eldoneblecojn, mi decidis daŭrigi la entreprenitajn taskojn.

Ĉi tiu verko celas provizi la Esperantoparolantojn per materialo uzebla en la ĉiutaga interparolo. Mi nun preparas francan-Esperantan esprimaron, kies aldono konsistigos la dulingvan trilogion. Kritikojn, konsilojn kaj proponojn mi dankeme akceptos por eventuala reeldono.

Lucien BOURGOIS

29 rue Gambetta, F 62950 NOYELLES GODAULT

A bientôt !

Ĝis baldaŭ !

A bon entendeur, salut !

Por saĝulo sufiĉas aludo ^z

Saĝa kapo duonvorton komprenas ^z

A ce compte-là...

Laŭ tiu rezonmaniero...

A ce qu'on dit

Laŭdire

A coup sûr !

Nepre !

Certe !

A charge de revanche

Kun la kondiĉo de repago

A d'autres !

Tion rakontu al pli kredemaj !

A dire vrai

Se paroli sincere

Vere

Agissez comme bon vous semble

Agu tiel, kiel vi decidis

Ah bon !

Ha, jen...

Ah, ça alors !

Be !

Ah ! c'est fâcheux !

Ha, tio estas bedaŭrinda !

Ah ! c'est vous ?

Ho, estas vi ?

Åh, non, tout de même !

Ho ne, tamen ne... !

Ah, oui ?

Ho, ĉu ?

Ainsi

Tiel

A la bonne heure !

Nu bone !

A la fin des fins !

En la fino de l' finoj !

Ĝis la fino de la fino

A la prochaine !

Ĝis !

A la réflexion

Pripensante...

A la rigueur

Se nepre necese

A l'avenir

Estonte

A l'en croire

Se oni kredas al li

Allez au diable !

Forportu vin !

Allez-y

Ek !

Allons donc !

Nu do !

A l'occasion

Okaze

Alors, c'est dit ?

Nu, ĉu decidite ?

A ma connaissance

Laŭ mia scio

Miascie

A maintes reprises

Multfoje

Ade

A moins que / de

Escepte se

Krom se

A mon avis
Laŭ mia opinio
Miaopinie
Laŭ mia vidpunkto
Miavidpunkte

A mon insu
Sen mia scio

A n'en pas douter...
Ne estas dubinde, ke...

A plus forte raison
Tiom pli merite (prave)

Après tout
Cetere
Se ĉion konsideri

Après vous !
Nur malantaŭ vi !

A (ce) propos
Jen mi pensas !
Ha ! pri tio !

A qui ai-je l'honneur ?
Al kiu mi havas la honoron ?

A qui le dites-vous !
Ve, mi mem tion spertis !

A quoi bon ?

Ĉu utile ?

Por kio utilas ?

Arrête ton cinéma !

For la komedio !

Mallevu la kurtenon !

A supposer que...

Supoze, ke...

Se supozi, ke...

Assurément !

Certe !

Ja !

A tout jamais

Por ĉiam

A tout le moins

Se preni la plej malmulte / malpleje

A tout prendre

Se ĉion konsideri

Se ĉion kalkuli

A tout prix

Nepre

Attendu que...

Konsiderante, ke...

A très bientôt !

Ĝis plej baldaŭa revido !

Au bout du compte

Entute

Konklude

Aucunement

Neniel

Au demeurant

Cetere

Au fond

Efektive

Aujourd'hui même

Ĝuste hodiaŭ

Jam hodiaŭ

Au moins

Almenaŭ

Au nom du ciel !

Per ĉielo !

Au pis aller

En la plej malbona okazo (supozo)

Au plaisir de vous revoir !

Ĝis plezura revido !

Au plus tard
Plej malfrue

Au poil !
Trafe !

Aussi bien... (en début de phrase)

1) **Cetere**
Fakte

2) **Malgraŭ tio**

Autant dire
Tio samsignifas kiel

Autant que faire se peut
Kiom eble

Autant que j'en puis juger
Laŭ tio, kion mi povas juĝi
Laŭ tio, pri kio mi povas juĝi

Autant que je puis
Kiom mi povas

Autant que je sache
Kiom mi scias

Autant qu'il m'en souvienn
Kiom mi memoras

Autant vaut
Estas pli bone

Autrement dit
Alidire

Avant tout
Antaŭ ĉio
Precipe

A votre aise!(guise)
Laŭ via plaĉo !

A votre convenance
Laŭ via oportuno

A votre intention
Destine al vi

A votre place
Se mi estus sur via loko

A vous entendre
Laŭ viaj paroloj

A vrai dire
Verdire
Ĝustadire
Por ĝuste diri
Se diri (konfesi) la veron

La barbe !
Ja sufiĉe !
Supertede !

Bas les pattes !
For la manojn !

La belle affaire !
Ne menciinde !

Bien dit !
Prave dirite !

Bien entendu !
Kompreneble !

Bien m'en a pris !
Tute prave mi tiel agis ! (faris)

Bien que
Malgraŭ ke (se)

Bien sûr !
Ja !

Bien volontiers !
Tre volonte !
Volonte jes !

Bon amusement !
Bonan plezuron !

Bonne chance !
Bonŝancon !
Ĉion bonan !

Bonne route !
Sekuran (feliĉan) vojon !

Bon voyage !
Bonan (feliĉan) vojaĝon !

Bravo !

Brave !

Bonege !

Bref !

Per unu vorto !

Unuvorte !

Mallonge !

Ça commence à bien faire !

Sufiçe !

Ça coule de source !

Memevidente !

Ĉi tio jam fluas, kiel akvo el fonto !

Ça finira bien par s'arranger !

La afero jam iros !

Calmez-vous, je vous prie !

Kvietiĝu, mi petas !

Ça m'est parfaitement égal !

Al mi tutegale !

Ça ne coûte rien de demander

Demando ne kostas, demando ne

devigas

Ça ne fait rien !

Ne ĝenas !

Ça ne prend pas !
Ĉe mi, tio ne utilas !

Ça ne sert à rien !
Neniom helpas !

Ça se gâte !
Acidiĝas !

Ça tombe bien !
Kiel bonokaze !
Oportune !

Ça tombe à pic !
Ĝi trafe okazas !

Ça va ?
Ĉu bone ?

Ça va pas, non ?!!
Ĉu vi frenezas ?!!

Ceci dit en passant !
Pretere estu dirite !

Ceci dit entre nous !
Inter kvar okuloj !

Cela demande réflexion !
Pripensinde !

Cela est hors de doute !
Tio estas eksterduba ! (senduba)

Cela lui revient de droit !

Li ja meritas tion !

Cela ne fait aucun doute !

(pas l'ombre d'un doute)

Ne ekzistas dubo pri tio !

Ne restas loko por ia dubo !

Cela ne me dit rien qui vaille

Suspektinda, tio !

Mi aŭguras malbone !

Tio ŝajnas al mi neniel bonaŭgura !

Cela ne vaut pas la peine d'en parler !

Ne menciinde !

Ne inde eĉ paroli pri tio !

Cela peut attendre !

= Il n'y a pas le feu !

La afero ne brulas !

Cela va de soi !

Memkompreneble !

Memsekve !

Tio ĉi estas memevidenta !

Cela va sans dire !

Ne bezone diri !

Memkompreneble !

Tute kompreneble !

Cela vaut la peine que...
Ĝi valoras, ke... (-u)

Cela vous plaît à dire !
Vi ne parolas serioze !

Ce ne sera pas long !
Ne daŭros longe !

Ce ne sont pas les scrupules qui
l'étouffent !
La konscienco lin ne turmentas ! z

C'en est assez !
Sufiĉe kun tio !

Ce n'est pas de la rigolade !
Tio ĉi ja ne estas petolaĵo !

Ce n'est pas demain la veille !
voir : C'est pas demain la veille !

Ce n'est pas de mon ressort !
Tio ne dependas de mi !
Tio ne koncernas mian fakon !
Mi ne kompetentas pri tio !

Ce n'est pas de refus !
Certe ne estas rifuzo !

Ce n'est pas des mots qu'il nous faut,
ce sont des actes !
Vortojn ŝparu, agojn faru ! z

Ce n'est pas drôle !

Ĝi ja ne estas aparte gajiga !

Ce n'est pas du tout ça !

Tute ne temas pri tio !

Ce n'est pas encore chose faite !

Ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko!

Ĝi estas ankoraŭ pasero en la aero!

Ĝi havas ankoraŭ signon de demando!

La sigelo ankoraŭ ne estas metita!

Ce n'est pas étonnant !

Ne mirige !

Ce n'est pas la porte à côté !

La distanco estas granda !

Ce n'est pas l'envie qui lui manque !

Li (ŝi) volonte farus tion !

Ce n'est pas le quart d'heure !

La momento ne taŭgas !

Ce n'est pas ma faute !

Ĝi ne estas mia kulpo !

Tio venas ne el mia kulpo !

Mi ne kulpas pri tio !

Ce n'est pas malin !

Stulte !

Ce n'est pas mon affaire !

Min ne tuŝas la afero !

Ce n'est pas peu dire !

Vi iom troigas

Ce n'est pas pour bientôt !

Tio ne estas tre baldaŭ !

Ce n'est pas sans étonnement que...

Ne sen ia miro...

Ce n'est pas une petite (mince) affaire !

La afero ne estas simpla !

Ce n'est pas un hasard si...

Ne estas hazardo, ke...

Ce n'est pas votre affaire !

Tio ne estas afero via !

Ce n'est que partie remise !

(Ĝi estas) nur prokrastita afero !

Prokrastita ne estas perdita² !/forĵetita^(plezuro)

Ce n'est que patience à prendre !

Nur paciencu !

Ce n'est rien !

Ne gravas !

Ce qui est dit est dit !

Vorto dirita neniam revenos !

(voir page suivante)

**Kiam vorto eliris, vi ĝin jam ne retenos
Kio el la dentoj elsaltas, en la lipoj ne
haltas^z**

**Kio tra l'dentoj travenis, tion la lipoj
ne retenos^z**

Ce qui est fait est fait !

Farita - elstrekita !

Farita ne refariĝos^z

Kio estas farita, estas sankciita^z

Kio fariĝis jam ne refariĝos^z

Kontraŭ faro farita ne helpas medito^z

Certainement !

Certe !

Certes !

Ja !

C'est-à-dire

Tio estas

C'est affaire de goût !

Tio estas demando de gusto !

C'est ainsi que vous l'entendez ?

Jen tiel vi prenas la aferon !^z

C'est à prendre ou à laisser !

La propono estas neŝanĝebla !

C'est aussi ce que je me disais !

Mi tiel ankaŭ pensis al mi !

C'est à vos risques et périls !

La risko estas via !

C'est beaucoup dire !

Vi trograndigas la aferon !

C'est bien aimable à vous !

Afable de vi !

C'est bien fâcheux !

Tre bedaŭrinde !

C'est bien le moindre de mes soucis !

Mi tute ne zorgas pri ĝi !

C'est bien ma veine !

Jen mia bonŝanco !

C'est bon à savoir !

Registrinde !

C'est cela !

Jes, ĝuste !

C'est ce que je vous demande !

Ja tion mi petas (de vi)

C'est chose faite !

La afero estas plenumita !^z

- C'est de bonne guerre !
Gi estas permesita batalrimedo !
- C'est déjà beau que...
Estas ja feliĉo, ke...
- C'est de la foutaise !
Fuŝaĵo !
- C'est dit !
Konsentite !
- C'est dommage !
Domage !
- C'est du joli !
Jen bele !
- C'est du pareil au même !
Estas egale !
- C'est du vent !
Vento, ĉio tio !
- C'est entendu !
Konsentite !
- C'est foutu d'avance !
Tio jam anticipa kaputigiĝis !
- C'est heureux !
Maldomage !

C'est hors de doute !

Nedubeble !

Tio estas ekster dubo !

C'est inadmissible !

Nepermeseble !

C'est justement ce que je voulais vous dire !

Ĝi estas ĝuste tio, pri kio mi volis paroli kun vi ! ^z

C'est l'affaire d'un instant !

(Tio postulos) nur momenton ! ^z

C'est la moindre des choses !

Neniel dankinde !

C'est là que le bât blesse !

Tie jukas, kie oni gratas ! ^z

Tie pikas la hoko en la ezoko !

Jen la tikla punkto !

Tie estas la vunda loko !

C'est la cadet (le moindre) de mes soucis!

Ne mia zorgo !

Mi fajfas pri ĝi !

C'est le moindre qu'on puisse dire !

Ne malpli direble !

Pli malmulte oni ne povas diri !

C'est le moment où jamais !

Ĝuste nun aŭ neniam !

C'est l'éternel refrain !

Ĉiam la sama kanzono !

C'est ma faute !

La kulpo estas mia !

C'est mon affaire !

Tio koncernas min !

C'est mon dernier mot !

Tio estas limvorto !

C'est navrant !

Tio estas plorinda !

C'est oui ou c'est non ?

Finfine, jes aŭ ne ?

C'est pas demain la veille !

Tio ne estas tre baldaŭ !

C'est peine perdue !

Autant frapper son cul par terre !

Neniom helpas !

Vana peno !

Kiom ajn vi penos, nenio elvenos ! ²

Nenia peno nek povo donas lakton de bovo ²

Melku bovon (virkapron) senfine,
li lakton ne donos ^z

Ĝi estas kiel mustardo post la mango ^z

Ĝi estas pluvombrelo post la pluvo
Kiam kato jam formangis, forpelado
ne helpas ^z

Lavu tutan jaron, negro ne blankigos ^z

Nuksoj venis, kiam dentoj elfalis ^z

Post morto kuracilo jam estas sen
utilo ^z

Tie vi petos, vi tiros, vi nenion akiros ^z

C'est pourquoi

Tial

Jen la kaŭzo, kial

C'est promis !

Promesite !

C'est raté !

La afero malsukcesis ! ^z(fiaskis)

C'est réglé !

En ordo !

C'est regrettable !

Bedaŭrinde !

C'est sans importance !

Tute ne grave !

Bagatele !

C'est son affaire !

Tio estas lia (ŝia) afero !

C'est toujours ça !

Tio estas tamen gajno !

C'est tout !

Jen ĉio !

Nenio pli !

Jen la tuta afero !

C'est tout dire !

Oni ne povas diri pli !

C'est tout le contraire !

Eĉ tute male ! (kontraŭe)

C'est tout ou rien !

Aŭ ĉio, aŭ nenio !

C'est tout une histoire !

Estas komplika afero !

C'est très aimable à vous !

Tre afable de vi !

C'est trop beau pour être vrai !

Ne kredinde !

Tio estas tro bela por esti vera !

C'est trop de grâce que vous me faites !

Vi estas tro bona kontraŭ mi !

C'est trop fort !

Tio ja estas tro !

C'est une autre histoire !

Ĝi estas tute malsama afero !

C'est une autre paire de manches !

Estas alia paro da ŝuoj !

C'est (une) question de goût !

Tio estas demando de gusto !

C'est une raison comme une autre !

Taŭgas ĉi tiu kialo ne malpli ol aliaj !

C'est une simple question de temps !

Estas nur demando pri la tempo !

C'est une vieille histoire !

Tio estas malnova afero !

Estas konata historio !

C'est votre dernier mot ?

Ĉu mi konsideru tion kiel limvorton ?

C'est vous qui le dites !

Nur vi tion asertas !

Tion asertas vi !

C'est vrai ?

Ĉu vere ?

C'est vrai !

Ja vere !

Cette confiance m'honore !

Tiu via fido honoras min !

Cette question m'amène à ...

Tiu ĉi demando alkondukas min al ...

Chacun a ses petites misères !

Ĉiu havas sian vermon !

Changez de disque !

Sangu la diskon, ĝi tedas !

Chaque fois que

Ĉiufoje, kiam

Chiche !

Spit !

Chut !

Ĉit ! = ŝŝ ! = ts !

Comme de bien entendu !

Memkompreneble !

Comme de juste

Kiel estas juste

Kiel decas

Comme de raison

Laŭ konveneco

Comme il est permis de le croire

Opinieble

Comme il se doit

Kiel decas

Comme il vous plaira !

Kiel plaĉas al vi !

Laŭ via plaĉo ! (bontrovo)

Comment cela va-t-il finir ?

Kio rezultos el tio ?

Comment, vous aussi ?

Ho, ĉu ankaŭ vi ?

Comment vous y êtes-vous donc pris ?

Kiel do vi igis ?

Comme on peut le supposer...

Supozeble

Comme par hasard

Kvazaŭ hazarde

Kvazaŭ per okazo

Comme si de rien n'était

Kvazaŭ tute indiferente

Compte là-dessus et bois de l'eau !

Mendu - atendu ! ²

Tute ne esperu tion !

Jes, kredo tion ! (ironie)

Comptez sur moi !

Vi povas kalkuli kun mi !

Couci-couça !

Iele iome !

Coûte que coûte !

Kostu kiom ĝi kostos

D'accord !

Konsentite !

D'ailleurs

Cetere

Dans ce cas

Tiuokaze

Dans la mesure de mes possibilités

Kiom mi povos

Dans la mesure du possible

Kiom nur eble

D'après moi

Laŭ mia opinio

Miaopinie

Laŭ mia vidpunkto

Miavidpunkte

D'aucune manière !

Neniel !

D'aujourd'hui en huit

De hodiaŭ post semajno

D'autant mieux (plus) que
Tiom pli, çar

D'autre part
Aliparte
Aliflanke

De grâce !
Mi vin petegas !

De la sorte
Tiamaniere

Demain en huit
Morgaŭ post sep tagoj

De même pour vous !
Same al vi !

De même que...
Same kiel...

Démerdez vous !
Elkotigu mem !

De part et d'autre
Unuparte... aliparte

De prime abord
Unuavide

Depuis combien de temps ?
De kioma tempo ?

De quoi parlez-vous ?

Pri kio vi parolas ?

De quoi s'agit-il ?

Pri kio temas ?

Pri kio (estas) la afero ? (parolo)

De rien !

Nedankinde !

Dès à présent

Jam nun

Désolé de ne pouvoir vous satisfaire !

Min doloras la nepovado kontentigi vin! ^z

Des oreilles, ça se lave !

Nur streĉu la orelon !

Désormais

De nun

De sorte que

Tiamaniere ke

Dès que...

Tuj kiam

De suite

Tuj

De temps à autre

Fojfoje / Iam-tiam

De toute manière

Ĉiel

En ia ajn maniero

Dispensez-vous de vos réflexions !

Ŝparu viajn rimarkojn !

Dites donc !

Diru nun ! (invitation à parler)

Nu, diru ! " "

- **Ho, vi...!** (interpellation)

Dites donc, en voilà assez !

- **Nu, sufiĉe !**

Dites donc, vous rigolez ?

Hej, ĉu vi serĉas ?

Dites-lui bien des choses de ma part !

**Transdonu al li multajn komplimentojn
de mi**

Dites toujours !

Nu, diru !

Dommage !

Domage !

Donnez-lui le bonjour de ma part !

Salutu lin de mi !

Donnez-vous la peine de...

Bonvolu...

Dorénavant
De nun

D'ores et déjà
Ekde nun

Du moins
Almenaŭ

D'une façon ou d'une autre
Iel aŭ aliel
Unumaniere... alimaniere

D'une part... d'autre part
Unuparte... aliparte
En unu flanko... en alia flanko
De unu flanko... de la alia flanko
Unuflanke... aliflanke

Du reste
Cetere

Eh !
Ej !

Eh bien !
Nu !

Eh bien alors !
Sekve nu !

Eh bien dans ce cas
En tiu okazo, do,

Eh bien, dites donc
Sed diru do, (invitation à parler)
Ha, ha ! (étonnement)

Eh bien, qu'y a-t-il ?
Nu do, kio estas ?

Eh bien, soit !
Nu, tiel estu !

Eh oui, au fait...
He, fakte jes...

En admettant que...
Eĉ se

En attendant que
Dume

En aucun cas
Neniuokaze
Sub neniu cirkonstanco

En aucune façon
Neniel

En ce cas
Tiuokaze
En tiu okazo

En ce qui me concerne
Koncerne de mi

Enchanté !...

Tre kontenta !...

Mi ĝojas !...

Enchanté de faire votre connaissance !

Estas al mi tre agrable konatiĝi kun vi!

Mi ĝojas ! (konatiĝi kun vi) !

Mi estas tre kontenta ! (konatiĝi kun vi)!

Encore une question !

Unu kroman demandon !

En d'autres termes

Alivorte

Per aliaj vortoj

En effet !

Efektive !

En est-il bien ainsi ?

Ĉu ĉi tiuj aferoj estas tiel ?

En fin de compte

Se ĉion konsideri

Konklude

Enfin, vous voilà prévenu !

Kaj nun vi estas avertita !

En mettant les choses aux mieux

En plej bona okazo

En premier lieu
Tutunue
Je la unua loko

En quelque sorte
Kvazaŭe

En quoi cela me regarde-t-il ?
Per kio tio tuŝas min ?

En quoi cela vous concerne-t-il ?
Per kio tio koncernas vin ?

En quoi puis-je vous être agréable ?
Per kio mi povas komplezi al vi ?

En quoi puis-je vous être utile ?
Per kio mi povas servi al vi ?
Kiel mi povas helpi vin ? (utili al vi)
Ĉu mi povas per io ajn esti utila al vi?

En réalité
Efektive

En revanche
Kompense

En somme
Konklude
Resume
Sume

Entendu !
Konsentite !

En tout bien, tout honneur !
Tute bonintence !

En tout cas
Ĉiaokaze

En tout état de cause
Ĉiamaniere
Ĉiel

En tout et pour tout
Entute

Entre nous soit dit
Se diri (paroli) inter ni

Entre parenthèses
Parenteze dirate

En un mot
Unuvorte
Per unu vorto

En vérité
Vere
En vero

En voilà des façons !
Jen belaj manieroj !

Espérons que tout ira pour le mieux !
Ni esperu la plejbonon !

Est-ce à moi que vous vous en prenez ?

Ĉu tio (kion vi diras) min celas ?

Est-ce ma faute ?

Ĉu mi kulpas ?

Est-ce vous ?

Ĉu vi ?

Et alors ?

Kaj sekve

Et après ?

Kaj sekve ?

Nu, plu ?

Et après tout

Finfine

Et ce n'est pas tout !

Ne tio estas ĉio !

Sed ne nur tion ! (mi diru)

Kaj ankoraŭ tio ne estas ĉio

Et moi non plus !

Kaj mi ankaŭ ne !

Et puis après ?...

Kaj do ?

Eu égard à

Konsidere de

Evidemment !
Kompreneble !

Exactement !
Ĝuste jes !

Excusez-moi !
Pardonu ! (min)
Senkulpigu min !

Expliquez-vous !
Klarigu vian penson !

Facile à dire !
Facile dirite !

Faites !
Bonvolu...

Faites comme bon vous semblera !
Agu laŭ via plaĉo !

Faites comme chez vous !
Sentu vin kiel hejme !^z

Faites le entrer !
Petu lin enveni !

Faute de mieux
Manke de pli bona

Faut-il s'en étonner ?
Ĉu oni do povas miri pri tio ?

Faut-il vous rappeler que
Ĉu mi revoku en vian memoron, ke

Faut pas se gêner !
Kia senĝenaĉeco !

La ferme !
Silentaĉu !

Ferme ton bec !
Fermu vian klapon !

Fichez (foutez) moi le camp !
For de ĉi tie !
En bona ordo tra la pordo !
Pafiĝu for !

Figurez-vous que
Imagu, ke
Sciu do :

Forcément !
Neeviteble !

Fort bien !
Jen, jen...

Gardez cela pour vous !
Ne disbabilu tion !
Ne transdiru tion !

Gardez-vous bien d'en parler !
Zorgu, ke vi diru al neniu !

Grand bien vous fasse !

Dio benu vin !

Il en est question !

Pri tio estas la parolo !

Il en va tout autrement de

Tute alia afero estas kun

Il est bien entendu que

Konsentite, ke

Il est bien loin de s'en douter !

Li havas pri tio nek scion nek supozon!

Il est bien temps !

Jam malfrue !

Il est certain que

**Bone konata afero estas ke
Nedubeble**

Il est grand temps !

Estas urĝa tempo !

La afero urĝegas !

Il est peu probable que...

Malcerte, ke...

Ne verŝajne estas, ke

Il est temps !

Jam tempo estas !

- Il faut faire en sorte que
Necesas aranĝi, ke
- Il faut faire gaffe !
Atentindas !
- Il faut le voir pour le croire !
Ne kredu al orelo, kredu al okulo !^z
- Il faut pourtant en sortir !
Necesas tamen elturniĝi !
Necesas tamen eliĝi el tiu situacio !
- Il faut voir les choses en face !
Necesas rigardi la aferon rekte !
- Il ferait beau, que
Estus tre bele, ke
- Il importe avant tout que
La ĉefaĵo estas tio, ke
- Il m'a chargé de
Al mi li komisiis, ke mi ...u
- Il me faut prendre congé !
Mi bedaŭrinde devas peti forpermeson
- Il me le paiera !
Mi pagos al li pro tio !
- Il me tarde de
Mi sentas sopiron al

Il n'a pas le feu sacré !
Al li mankas entuziasmo !
Li ne kuras post la laboro !

Il n'a qu'à bien se tenir !
Li devas ja sin gardi !

Il n'a que ce qu'il mérite !
Kiel li meritis, tiel li profitis !^z
Prave li ricevas !^z
Prave punite laŭmerite !^z
Kia fripono, tia bastono !^z
Ricevis bandito laŭ sia merito !^z
Tion li ne malmeritis !^z

Il n'a rien à voir là dedans !
Tio tute ne koncernas lin !

Il ne fait aucun doute que
Ne estas dubinde, ke

Il ne faut pas se gêner !
Kia aplombo !

Il ne faut pas s'imaginer que ça va se
passer comme ça !
Ne supozu, ke ĉio tiel facile solvigos!

Il ne l'a pas volé !
voir : il n'a que ce qu'il mérite !

- Il ne manquait plus que cela !
Jen kio ankoraŭ mankis !
- Il ne manquerait plus que ça !
Nun mankas ankoraŭ, ke...
- Il n'en est pas moins vrai que
Tamen restas la fakto, ke
- Il n'en est pas question !
Pri tio ne estas la parolo !
- Il n'en fera jamais d'autres !
Nur stultaĵojn li kapablas fari !
- Il ne perd rien pour attendre !
Pli-malpli frue venos lia puno !
Venos lia tempo de puno !
- Il ne peut même pas en être question !
Pri tio ne povas esti eĉ parolo !
- Il ne s'agit pas de cela !
Ne pri tio temas la parolo !
- Il n'est pas dit que
Nenio pruvas, ke
- Il n'est pas question de ça !
Ne pri tio estas la parolo ! (afero)
- Il ne tardera guère !
Tre baldaŭ li alvenos !

Il ne tardera guère à (+ infinitif) !
Tre rapide li ...os !

Il ne tiendra qu'à vous !
Dependos nur de vi !

Il n'y a jamais fait la moindre allusion !
**Li neniam faris eĉ la plej malgrandan
aludon pri tio**

Il n'y a pas à dire !
**Ne kontraŭdireble !
Nekontesteble !**

Il n'y a pas de quoi !
**Ne dankinde !
Ne estas kaŭzo por tio !**

Il n'y a pas de quoi en être fier !
**Tio ne estas deca kaŭzo por fieriĝo !
Li (ŝi, vi) ne tre povas paradi !**

Il n'y a pas de quoi rire !
(Tio) ne estas inda je rido !

Il n'y a pas de quoi se vanter !
Li (ŝi, vi) ne tre povas fanfaroni !

Il n'y a pas de raison pour...
Ne ekzistas kaŭzo (pravigo) kial ...us

Il n'y a pas de temps à perdre !
**Ne restas tempo !
Nenia tempo estas perdota !**

- Il n'y a pas d'heure pour les braves !
Bravulo ĉiam pretas !
- Il n'y a pas grand monde !
Ne estas multe da personoj !
- Il n'y a pas le choix !
Elekto ne ekzistas !
- Il n'y a pas mère !
Estas tute neeble !
- Il n'y a plus que patience à prendre !
Nur paciencu !
- Il n'y a rien à faire !
Neniom helpas !
- Il peut faire une croix dessus !
Li nepre rezignu pri tio !
Li tute ne esperu tion !
- Il peut toujours se fouiller ! (siffler)
Lia espero estas vana ! (malprava)
- Il pourrait bien vous en cuire !
Vi eble pentos pri tio !
- Il s'agit bien de cela !
Tute ne pri tio estas la parolo !
Tute ne temas pri tio !

Il s'agit de cela !

Temas pri tio !

Il se croit tout permis !

Li imagas sin superleĝa !

Il s'en fallait de peu que

Ne multe mankis, ke ...u

Ils peuvent se donner la main !

Ili ne valoras pli unu ol la alia !

Il va de soi !

Memevidente !

Il va de soi que

Estas pli ol verŝajne, ke

Il va sans dire que

Nebezone diri, ke

Senutile (estas) diri, ke

Il vaudrait peut-être mieux que je m'en aille !

Estus eble pli bone, se mi forirus !

Il y a bien de quoi !

Estas nenia kaŭzo !

Il y a de l'eau dans le gaz !

Estas tubero en la afero !^z

- Il y a de l'orage dans l'air !
La atmosfero estas malserena !
- Il y a de quoi !
Estas kaŭzo por tio !
- Il y a des chances que
Supozeble, ke
- Il y a du louche !
Suspektinde !
- Il y a gros à parier que
Estas multaj ŝancoj por la veto, ke
Oni ja povas veti, ke
Estas ja tute atendeble, ke
Tre verŝajne... -os
- Il y a un os !
Estas tubero en la afero !
La afero ne iras glate !
- Il y aurait beaucoup à dire là-dessus !
Estas multaj kritikindaĵoj rilate tion !
- Inutile de dire
Superflue diri
- J'ai acquis la ferme conviction que
Mi venis al firma konvinko, ke²
Mi akiris la konvinkon, ke

J'ai à vous parler !
Mi devas paroli kun vi !

J'ai bien fait de ...
Bone, ke mi ...-is

J'ai bien l'honneur de vous saluer !
Mi havas la honoron saluti vin !

J'ai cru bien faire !
Mi pensis (opiniis), ke mi bone faras !

J'ai déjà trop abusé de votre hospitalité!
Mi jam tro longe trouzis vian gastamon!

J'ai deux mots à vous dire !
Mi volas diri al vi kelkajn vortojn !

J'ai l'avantage de vous annoncer
Mi havas la favoron sciigi al vi

J'ai le mot sur le bout de la langue !
La vorto ŝvebas al mi prete sur la lango !

J'ai le plaisir de vous dire ...
(Mi havas) la plezuron diri al vi

J'aime à croire que
Mi volas kredi, ke

J'aime vous l'entendre dire !
Plezurigas min, ke vi diras tion !

J'ai tout lieu de croire que
Ĉio kredigas al mi, ke

J'ai tout lieu d'espérer que
Ĉio esperigas al mi, ke

Jamais de la vie !
Neniel !

J'attire votre attention sur le fait que
Mi turnas vian atenton sur tio, ke

J'aurai grand plaisir à
Estos tre plezure al mi

J'aurais bien voulu t'y voir !
Mi ja volus vidi vin en la cirkonstanco!

J'aurais dû commencer par là !
Mi devus esti komencinta per tio !

J'aurais dû m'en douter !
Tion mi ja devis supozi !

Je commence à en avoir assez !
Sufiĉe kun tio !
Mi ektedigas !

Je compte venir vous voir dans la
semaine qui vient !
**Mi intencas viziti vin proksiman
semajnon !**

Je crains en avoir trop dit !

Mi timas, ke mi jam diris tro multe !

Je crains qu'il ne soit trop tard !

Verŝajne estas nun tro malfrue !

Je crois fermement que

Mi kredas forte, ke

Je crois inutile de prolonger la discussion!

**Mi kredas senutila la daŭrigon de la
diskutado !**

Je crois pouvoir dire que

Tre verŝajne

Je dirai même

Kaj eĉ mi diros

Je le suppose !

Mi supozas !

Je lui retiens un chien de ma chienne !

Mi repagos al li pro tio !

Je m'en balance !

Je m'en fiche !

Je m'en fous !

Mi fajfas pri ĝi !

Mi furzas je ĝi !

Je m'en garderai bien !

Mi nepre evitos tion !

Je me permets de vous faire remarquer
**Se vi tion permesas, mi rimarkigas
al vi**

Je m'y attendais !
Mi atendis tion !

Je n'ai plus qu'à me retirer !
Restas al mi nur foriri !

J'en conviens !
**Mi konsentas !
Konsentite !**

Je ne demande qu'à vous croire !
Mi tre volonte volas kredi vin !

Je n'en ai cure !
Je n'en ai rien à faire ! (à foutre)
**Tio tute ne tuŝas min !
Tion mi neniel prizorgas !
Kio min ne tuŝas kuŝu kiel kuŝas !^z**

Je n'en ai pas la moindre idée !
**Mi ne povus diveni !
Mi havas pri tio nenian ideon !
Mi havas pri tio nek scion, nek supozon!^z**

Je n'en dirai pas plus !
Mi ne bezonas diri pli multe !

Je n'en ferai rien !
Absolute ne !

Je n'en sais rien !

Mi tute ne scias !

Je ne pourrai pas faire grand'chose !

Mi povos fari ne tre multe !

Je ne sais comment vous remercier !

Mi ne trovas taŭgajn dankvortojn !

Je ne serai pas long !

Mi ne parolos longe !

Je ne veux même pas en entendre parler !

Eĉ aŭdi mi ne volas pri tio !

Je ne veux pas le savoir !

Mi ne volas tion ĉi scii !^z

Mi ne volas scii pri tio !

Je ne vois pas le rapport !

Mi ne kaptas (vidas) la rilaton !

Je ne voudrais pas le rencontrer au coin
d'un bois !

**Mi ne dezirus lin renkonti meze de
arbaro ! (en loko malluma)**

Je ne vous le fais pas dire !

Vi mem tion konfesas !

Je ne vous l'envoie pas dire !

Mi malkaŝe diras tion al vi !

Je ne vous retiens pas !
Forpermeson vi nun havas !

J'en fais mon affaire !
Mi prenas tion sur min !

Je n'irai pas jusque là !
Tion mi tamen ne pretendas !

Je n'osais pas l'espérer !
Ĝin mi ne esperis !

J'en passe, et des meilleures !
Mi povus diri plu !

J'en répons !
Mi ja respondas pri tio !

J'en suis bien fâché !
Mi ĉagreniĝas pri tio !

J'en suis persuadé !
Mi pri tio ne dubas !

J'en suis très flatté !
Vere flate por mi !

Je n'y manquerai pas !
Mi tion ne preterlasos !

Je n'y suis pour rien !
En tio mi neniel kulpas !

Je partage votre point de vue à ce sujet !
Mi konsentas kun vi en tio !

Je puis vous l'assurer !
Mi povas certigi vin pri ĝi !

Je serais trop heureux de le faire pour
vous !
Mi volonte ĝin faros por vi !

J'espère que vous me rappellerez à son
bon souvenir !
**Mi esperas, ke vi rememorigos lin
(ŝin) pri mi !**

Je suis à votre entière disposition !
Mi estas tute je via dispono !

Je suis confus !
Mi estas konfuzita !

Je suis en mesure de vous annoncer
Mi havas la kapablon anonci al vi

Je suis heureux d'être en mesure de
Mi ĝojas, ke mi povas

Je suis votre homme !
**Vi povas disponi pri mi !
Mi estas je via dispono !**

Je suis votre obligé !

Mi estas al vi dankoŝulda !

Je tâcherai de...

Mi penos atingi, ke...

J'étais loin de m'en douter !

For eĉ, ke mi suspektus tion !

Je tenais à vous dire que

Mi nepre volis aserti al vi, ke

(Si...) Je te paierai des cerises !

... Musoj mangos katojn !

Je verrai...

Mi pripensos...

Mi ekzamenos la aferon!

Je veux bien vous croire !

Mi volonte kredas vin !

Je voudrais vous demander une faveur !

Mi volus peti de vi komplezon !

Je vous assure que...

Mi certigas vin, ke

Je vous en prie !

Mi petas !

Bonvolu !

Je vous l'accorde !

Pri tio mi cedas... !

Tion mi cedas al vi !

Mi konsentas pri tio !

Je vous l'avais bien dit !

Mi tion jam diris al vi !

Mi antaŭavertis vin pri tio !

Je vous le donne en mille !

Nur provu diveni !

**Vi havas eĉ ne unu ŝancon kontraŭ
mil por diveni !**

Je vous revaudrai ça !

Mi dankos al vi pro tio !

Je vous somme de sortir !

Mi ordonas, ke vi eliru, for !

Je vous suis infiniment reconnaissant !

Mi estas al vi dankoplena !

Je vous vois venir (avec vos gros sabots)!

Mi vidas kion vi celas !

J'irai jusqu'à dire

Mi eĉ diros

J'irai même jusqu'à dire que

Mi eĉ diros, ke

Mi asertas eĉ, ke

J'ose espérer que
 Mi kurağas esperi, ke
Jusqu'à un certain point
 Iel
 Ĝis certa grado
Justement !
 Ĝuste tial !
J'y compte bien !
 Tion mi esperas !
J'y consens !
 Konsentite !
J'y tiens !
 Tion mi tre volas ! (deziras)
J'y vais de ce pas !
 Mi tuj iros tien !
J'y veillerai !
 Mi pri tio atentos !
Laissez-moi faire !
 Lasu min nur aĝi !
Laissez-moi rire !
 Permesu, ke mi ridu !
 Jen plaĉa rezonmaniero !

Là n'est pas la question !

Ne pri tio estas la parolo !

Loin de moi cette intention !

Tio estas for de mia intenco !

Loin de moi cette pensée !

Mi estas tute malinklina je tiu penso !

Loin de moi l'intention de

Malproksima estas de mi la intenco, ke

Loin s'en faut !

Tute male !

Mais bien sûr !

Kompreneble jes !

Mais certainement !

1) **Ja certe !**

2) **Tute prave !**

Mais, c'est navrant !

Sed tio estas bedaŭrindega !

Mais non !

Certe ne !

Mais oui !

Jes ja !

Mais puisque je vous le dis !

Sed mi tion asertas al vi !

Mais, qu'allez-vous imaginer ?
Sed, kion vi imagas ?

Mais quoi !
Nu do !

Malgré tout
Malgraŭ ĉio

Ma parole !
Je mia vorto !

Mêlez-vous de vos propres affaires !
Zorgu pri la propraj aferoj !

Même pas !
Eĉ ne !

Merci d'avance !
Mi antaŭdankas !

Merci mille fois !
Mi dankas mulfoje !

Merci tout de même !
Tamen dankon !

Mettez-vous à l'aise !
Faru al vi oportune !

Mettez-vous à ma place !
Imagu do vin sur mia loko !

Mettez-vous bien ça dans la tête !
Bone notu tion en vian kapon !

Me voilà bien avancé !
Multe mi atingis !

Le mieux serait de
Plej bone estus

Mieux vaudrait
Pli bone estus

Moi non plus !
Ankaŭ mi ne !

Moins de paroles, des actes !
Vortojn ŝparu, agojn faru !^z

Mon oeil !
Blufo !
Ne kredinde !

Le mot a dépassé ma pensée !
La esprimo misformis mian penson !

Motus, bouche cousue !
Mute kun buŝo kudrita !

N'allez pas croire ça !
Tion ja ne kredu !

N'allez pas le chanter sur tous les toits !
Ne distrumpetu tion !

N'allez pas vous imaginer que
Ne imagu al vi, ke

Naturellement !
Kompreneble !

Néanmoins
Tamen

Ne bougez pas ! (fig.)
Ne agu !

Ne faites pas attention à moi !
Ne atentu min !

Ne manquez pas de revenir !
Revenu ja !

Ne me racontez pas d'histoires !
Ne rakontu al mi fabelon !

N'en croyez rien !
Tion ne kedu !

N'en faites rien !
Tion ne faru !

N'en parlons plus !
Ni lasu tion !

Ne revenons pas là-dessus !
Êi tion ni ne priparolu plu !

N'est-ce pas ?

Ĉu ne ?

Ne vous dérangez pas !

Ne ĝenu vin !

Ne vous donnez pas la peine de

Ne faru al vi la malagrablajon

Ne vous fâchez pas !

Ne ĉagreniĝu !

Ne vous inquiétez pas !

Ne maltrankviliĝu !

Ne vous mettez pas en peine !

Zorgu pri nenio !

Ni moi non plus !

Nek mi ankaŭ !

Kaj mi ankaŭ ne !

N'importe comment

Iel ajn

Non pas que

Ne ĉar

Non plus

Ankaŭ ne

Nek ankaŭ

Non sans raisons

Ne senprave

Iomrajte

Non seulement

Ne nur

Non seulement... mais encore

Ne nur... sed ankaŭ

Notez en passant

Notu preterpase

Nous avons du moins la satisfaction de...

Ni almenaŭ havas ĉi tiun kontentigon,

ke... -as

Nous avons eu la chance de ...

Bone al ni, ke ni ... is

Nous devons veiller à ce que ...

Ni devas esti tre singardaj, ke...

Nous finirons bien par en savoir le fin mot

Pri ĝi ni ja ekscios la tutan veron /

la ŝlosilvorton

Nous n'avons guère le choix !

Ni havas nenian alternativon, krom...

Nous n'avons plus rien à nous dire !

Nenio plu restas por diri inter ni !

Nous pouvons en conclure que...

Ni povas, nome, konkludi, ke...

Nous saurons bien le trouver !

Ni jam lin trovos !

Nous sommes foutus !

Ni estas fuŝitaj !

Nous voilà devant le fait accompli !

Ni estas ĉe finita fakto !

Nous y voilà !

Jen do ni havas !

Jen vi ĝin havas !

N'y comptez pas trop !

Ne tro kalkulu je tio !

On aura tout vu !

Ĉio estas permesebla !

Al tio mankas nenio !

On connaît la chanson !

Ni scias pri kio temas !

Tio estas konata afero !

On ne peut le nier !

Oni ne povas tion nei !

On ne se bouscule pas au portillon !

Ne svarmas la kandidatoj !

On n'est pas sur la même longueur d'ondes!
Ni ne priparolas la saman temon !

On sait ce que parler veut dire !
**Mi komprenas la fundan signifon
de viaj paroloj !**

Or...
Do...

Où en est l'affaire ?
Kiel statas la afero ?

Oui, ça va !
Jes, bone !

Oui, peut-être ...
Eble jes !

Où que ce soit
Kie ajn

Où voulez-vous en venir ?
Kion do vi celas (implicas) per tio ĉi ?

Par conséquent
Sekve

Par contre
Kompense

Par-dessus le marché
Plie

Pardon, excusez-moi !

Pardonu, senkulpigu min !

Pardon ! (permettez)

Permesu !

Parfait !

Bonege !

Parfaitement !

Certe jes !

Parlez pas de malheur !

Ne voku la malfeliĉon !

Parlons peu et parlons bien !

Rekte al la afero !

Parole d'honneur !

Vortoj de honoro !

Pas à ma connaissance !

Laŭ mia scio, ne !

Pas de blague !

Ne stultaĵu !

Pas de discours, des actes !

Ne rapidu kun vortoj, rapidu kun faroj!²

Pas de faux semblants !

Ŝajnigoj for !

Pas de quoi !

Ne menciinde !

Pas de sitôt !

Ne tiel baldaŭ !

Nebaldaŭ !

Pas du tout !

Tute ne !

Pas étonnant que

Ne estas surprize, ke

Pas le moins du monde !

Absolute ne !

Ne eĉ iom !

Pas possible ?

Ĉu vere ?

Efektive ?

Pas question !

Ja ne !

Nepre ne !

Passez votre chemin !

Iru vian vojon !

Pas tout à fait !

Ne tute !

Pas un mot !

Eĉ ne unu vorton !

Pas un mot de plus !
Eĉ ne unu vorton plu !

Pas vrai ?
Ĉu ne vere ?

Pensez-y !
1) **Ne forgesu !**
2) **Pripensu pri tio !**

Permettez !
Permesu !

Peu importe !
Ne grave !

Peu importe si...
Tute egale, ĉu...

Peut-être
Eble

Le plaisir est partagé !
La plezuro estas reciproka !

Plus d'une fois...
Pli ol unufoje...

Plutôt (ou)
Pli bone / ĝuste

Le plus tôt sera le mieux !
Ja pli baldaŭ (frue) des pli bone !
Plej rapide, plej bone !

Plutôt que de... mieux vaut...

Plivole (prefere) ol... pli valoras ...

Pour ainsi dire

Se tiel dîri

Pour autant que...

Laũ la mezuro, kiel

Pour changer de sujet

Por ŝanĝi la temon

Pour comble de malheur

Por plenigi la malfeliĉon

Pour être franc

Se paroli rekte

Pour éviter toute équivoque

Por eviti ĉian miskomprenon

Pour la dernière fois

Lastfoje

Pour la seule raison que

Sole nur tial, ĉar

Pour le peu que

Se eĉ malmulte

Pour ma part

Koncerne min

Pour qui me prenez-vous ?

Kia do vi kredas min ?

Pourquoi ?

Kial ?

Pour rien au monde !

Neniapreze !

Nek por pasero, nek por ansero !

Pour sûr !

Nu, certaĵo !

Tre certe !

Pourtant

Tamen

Pour tout dire

Unuvorte

Pour toute réponse

Anstataŭ ĉia respondo

Pourvu que...

1) Si seulement : **nur se**

2) A condition que : **kondiĉe ke**

Précisément !

Ĝuste jes !

Première nouvelle !

Jen por mi la unua sciigo (pri tio!)

Prenez-en note !

Notu ĝin al vi !

Prenez note !

Notu bone !

Priez-le de venir me voir !

Petu lin al mi !

Probablement !

Kredeble

Supozeble

Verŝajne

Puisque je vous le dis !

Certe jes !

Qu'à cela ne tienne !

Ni preterlasu tion !

Se dependas nur de tio !

Quand bien même

Se eĉ ...us

Spite ke

Quand je vous le disais !

Mi tion antaŭanoncis al vi !

Mi avertis vin pri tio !

Qu'avez-vous ?

Kio okazas (estas) al vi ?

Qu'avez-vous à me dire ?

Kion vi estis dironta al mi ?

Que ceci reste entre nous !

Ĉi tio restu inter ni !

Que ceci vous serve de leçon !

Ĉi tio servu al vi kiel leciono !

Que diable !

Diable !

Que diable faites-vous là ?

1) **Kion do vi faras ?**

2) **Kial do vi estas ĉi tie ?**

Que dis-je...

Eĉ

Que dois-je dire ?

Kion mi diru ?

Que feriez-vous à ma place ?

Kion vi farus, se vi sidus en mia loko?

Que je sache

Miascie

Laŭ mia scio

Que je sois pendu, si je ne dis pas la vérité !

La tero min englutu, se mi ne diras veron !

Quel bon vent vous amène ?
Kiu favora vento alblovis vin ?
Kia vento vin alportis ?

Quel culot !
Kia aplombo !

Quel dommage !
Kia domaĝo !^z

Que le diable l'emporte !
La diablo forblovu lin !

Que le diable m'emporte, si je mens !
La tero min englutu, se mi mensogas!

Quelle barbe !
Kia tedaĵo !
Kiel tedege !

Quelle que soit la décision que vous
prendrez ...
Kia ajn estos via decido...

Quelle scie !
Kia tedaĵo !
Kia ĉagreno !

Quelle tuile !
Kia ĉagreno !

Quel maladroît je fais !
Kiel mallerta mi estas !

Que me vaut cet honneur ?

Kio havigas al mi tiun honoron ?

Qu'en dites-vous ?

Kion vi opinias pri tio ?

Que ne l'avez-vous dit plus tôt ?

Kial vi tion ne diris pli frue ?

Qu'en pensez-vous ?

Kion vi opinias pri tio ?

Qu'entendez-vous par là ?

Kion vi komprenas sub tio ĉi ?

Qu'est-ce à dire ?

Kion tio signifas ?

Qu'est-ce que ça peut faire ?

Kion ĝi malhelpas (malutilas) ?

Kion do tio malhelpas ?

Qu'est-ce que je vous offre ?

Kian trinkaĵon (kion) mi proponu al vi?

Qu'est-ce que vous me chantez ?

Kion vi rakontas al mi ?

Kion vi fabelas ?

Qu'est-ce que vous pariez ?

Per kio la veto ?

Qu'est-ce qui me vaut l'honneur de votre
visite ?

**Kion celas la vizito, per kiu vi honoras
min ?**

Qu'est-ce qui vous amène ?

Kio vin venigis ĉi tien ?

Qu'est-ce qui vous prend ?

Kio farigis al vi ?

Kio vin trafis ?

La question se pose !

Ekestas nun demando !

Que veux-tu ...

Komprenu

Que voulez-vous dire par là ?

Kion do vi celas ?

Que vous le vouliez ou non, il n'y a pas
le choix !

Volu, ne volu, elekto ne ekzistas !

Qui l'aurait dit ?

Tio estis tute ne supozebla !

Neniu supozus tion !

Qu'il en soit ainsi !

Estu tiel do !

Qui vous dit que ... ?

Ĉu vi estas certa pri tio, ke... ?

Quoi de neuf ?

Kio nova ?

Quoi donc ?

Kion nome ?

Quoique

Kvankam

Quoi qu'il advienne

Kio ajn okazos

Quoi qu'il en coûte

Kiom ajn ĝi kostos

Quoi qu'il en soit

Ĉiaokaze

Estu kiel ajn

Quoi qu'on ait pu dire à ce sujet

Kion ajn oni diris pri tio

Quoi qu'on puisse dire

Kion ajn oni dirus

Qu'on le veuille ou non

Volu - ne -volu

Ĉu oni volas tion aŭ ne

Ĉu oni volas aŭ ne volas

Qu'y-t-il pour votre service ?
Per kio mi povas helpi al vi ?
Kiel mi povas helpi al vin?

Rassurez-vous !
Trankviliĝu !

Réflexion faite...
Post pripenso...

Remettez nous ça !
Refoje la saman !

Remettez-vous !
Kvietiĝu !

Reste à voir si...
Restas por vidi nur, ĉu...

Restez assis !
Restu sidanta !

Restez couvert !
Surhavu la kapveston !

Rien ne presse !
La afero ne urĝas !

Sait-on jamais ?
Kiu scias ?

Sans aucun doute !
Sen ia dubo !^z / Sendube !

Sans blague ?
Senŝerce ?
Ĉu serioze ?

Sans conteste ! (contredit)
Nekontesteble !
Nekontraŭdireble !

Sans délai
Senprokraste

Sans doute !
Probable !^z
Verŝajne !

Sans faute
Nepre

Sans l'ombre d'un doute !
Sen ia ombro da dubo !

Sans même aller plus loin
Ni irante ankoraŭ pli malproksimen

Sans parler de...
Se (por) ne paroli pri...

Sans que je vous l'apprenne
Sen sciigo mia

Sans tarder
Senprokraste

Sauf si
Krom, se

Selon que...
Laŭ tio, se
Depende de tio, ĉu

Selon toute probabilité
Laŭ ĉia kredebleco

Selon toute vraisemblance
Laŭ ĉiaj ŝajnoj
Plej verŝajne

Si bon vous semble
Se la koro tiras vin
Se plaĉos al via koro

Si ce n'est
Krom

Si ce n'est que
Se ne ke
Esceptinte ke

Si c'est non, c'est non !
Se ne, do ne !

Si fait !
Tamen !

Si jamais
Se iam

Si j'avais su !

Se mi nur estus sciinta !

Si je ne me trompe

Se mi ĝuste memoras

Si j'ose dire

Se tiel diri

Si le coeur vous en dit

Se la koro tiras vin

Se plaĉos al via koro

S'il ne s'agissait que de cela !

Se temus nur pri tio !

S'il ne tenait que de moi

Se dependus nur de mi

Sinon

Alie

Si par hasard

Se okaze

Si seulement

Se almenaŭ

Si seulement la possibilité se présente

Se nur (almenaŭ) estas eble

Si tant est que

Se estas akceptebla, ke

Si vous allez par là (fig.)

Se vi tiel rezonas

Si vous continuez à me parler sur ce ton

Se vi daŭrigos alparoli min laŭ tiu tono

Si vous m'en croyez

Se vi fidas al mi pri tio

Si vous n'y voyez aucun inconvénient

Se vi ne vidas en tio neoportunaĵon

Si vous n'y voyez pas d'objections

Se vi tion ne kontraŭas

Se vi ne estas kontraŭ tio

Soit !

Nu, konsentite !

Se tiel, nu, bone !

Son compte est bon !

Li nepre pagos ! (estos punata)

Sous aucun prétexte

Sub nenia preteksto

Sous cet angle

Laŭ tiu rilato

Sous peu

Post nelonge

Soyez assez aimable pour...
Estu tiel afabla kaj ... u

Soyez le bienvenu !
Bonvenon (al vi) !
Estu bonvenanta !

Supposé que...
Supoze, se...

Sûrement !
Certe !

Surtout
Precipe

Tant il est vrai que...
Tiom pli, ĉar estas vero, ke...

Tant il y a que
1) **Kio ajn estas**
2) **Tiamaniere, ke**

Tant mieux !
Tiom pli bone !
Des pli bone !

Tant pis !
Tiom pli malbone !
Des pli malbone !

Tant que
Tiel longe ĝis

Tant qu'il est encore temps
Dum ankoraŭ estas tempo

Telle n'était pas mon intention
Tion mi ne intencis

Tenez, je vais vous raconter
Aŭskultu, mi rakontos al vi

Tenez-le vous pour dit !
Notu bone tion al vi !
Ne atendu ripetadon !

Tenez vous bien !
Tute ne miru !

Tiens !
Ej !

Tiens ! Et moi qui croyais
Ĉu ? Ho, mi kredis

Tiens, vois-tu...
Jen vidu...

Tope là !
Touchez là !
Manklake, promesite !

Tôt ou tard
Pli-malpli baldaŭ

Toujours est-il que
Ĉiaokaze

Tout au plus
Apenaŭ

Tout autre à votre place
Ĉiu alia sur via loko

Tout autre que vous
Iu ajn krom vi

Tout beau !
Kviete !

Tout bien considéré
Tout compte fait
Se ĉion konsideri

Tout cela c'est bien joli, mais
Ĉio ĉi estas tre ĉarma, sed

Tout d'abord
Tutunue

Tout de même !
Tamen...!

Tout dépend de l'angle sous lequel on
voit la chose !
**Ĉio dependas de tio, kiel oni konsideras
la aferon !**

Tout de suite
Tuj

Tout doux !

Etete !

Tpr !

Dolçe !

Tout droit !

Rekte antaŭen !

Toutefois

Tamen

Toute franchise (en)

Tute sincere

Tout est arrivé par ma faute !

Per mia kulpo ĉio okazis !

Tout me porte à croire que

Ĉio kredigas min, ke

Tout n'est pas dit !

La sigelo ankoraŭ ne estas metita !^z

La lasta vorto (ameno) ankoraŭ ne

estas eldirita !

Tout paradoxal que ceci puisse vous paraître

Kiel ajn paradoksa tio ĉi al vi ŝajnas

Tout va bien !

Ĉio en ordo !

Tout va pour le mieux !

Ĉio iras plej bone

Très flatté !

Tio honoras min !

Très flatté de faire votre connaissance !

Tre kontenta konatiĝi kun vi !

Trève de plaisanterie !

Sufiĉe da ŝercoj !

Ĉesu ŝerci !

Trop, c'est trop !

Kio estas tro, tio estas tro !

Tu peux toujours courir !

Vanas esperi tion !

Vanas, ke vi esperu tion !

Une fois pour toutes

Unu fojon por ĉiam

Un point, c'est tout !

Unu, du, tri, finita la far' !

Nenio pli estas bezona !

Va voir ailleurs si j'y suis !

Iru kontroli aliloke, ĉu mi estas tie !

Veillez à ce que

Zorgu pri tio, ke

Venons-en au fait !

Al la afero !²

Ni transiru al la afero !²

Rekte al la afero !

Priparolu ni pri la afero !

Venons-en au sujet !

(Ni iru) al la temo !

Veillez avoir l'obligeance de

Veillez être assez aimable pour

Estu tiel afabla kaj ...-u

Veillez céder votre siège !

Bonvolu cedi vian seĝon !

Voilà ce que c'est que de ... (+ infinitif)

Jen kio venas, se oni ... -as

Voilà le hic !

Ĝuste tio estas la tubero ! (en la afero)

Jen staras la bovoj antaŭ la monto !²

Voire (même)

Ja

Volontiers !

Volonte !

Votre affaire est claire ! (minace aŭ ironie)

Via kazo estas tute klara !

Vous tour viendra !

Via tempo de puno iam venos !

Vous aurez de mes nouvelles !

Vi iam aŭdos pri mi !

Vous avez beau faire

Kiom ajn vi penos²

Vous avez la parole !

La parolvico apartenas al vi !

Vous avez ma parole !

Mi ja promesas tion al vi !

Vous avez mis le doigt dessus !

Vi ĝuste trafis !

Vous êtes enocre là ?

Ankoraŭ ĉi tie ?

Vous êtes toujours le même !

Vi estas ĉiam ankoraŭ la sama !

Vous êtes trop aimable !

Vi estas tro kompleza !

Vous êtes trop bon !

Vere afable de vi !

Vous ferez bien de...

Estos bone, se vi ... -os

Vous feriez bien de venir !

Vi prave farus, se vi venus !

Vous l'avez dit !

Vi tute ĝuste parolis !

Tio estas ja tute ĝusta !

Vous mangerez à la fortune du pot !

**Vi manĝos (dividos) kun ni kion donas
la okazo !**

Vi manĝos laŭ la hazardo de la menuo

Vous ne comblez !

Vi trofavoras (trohonoras) min !

Vous m'en voyez ravi !

Tre kontenta mi estas pro tio !

Vous n'avez rien à faire ici !

Ĉi tie estas nenio por vi !

Vous ne pourrez rien en tirer !

Al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpas !²

Vous ne pouviez pas le dire plus tôt ?

Kial vi tion ne diris pli frue ?

Vous ne sauriez croire

Vi ne povas imagi

Vous n'êtes pas au bout de vos peines !

Ne finiĝis viaj klopodoj !

Vous niez l'évidence !

Vi do rifuzas vidi, kio estas evidenta !

Vous n'ignorez pas que...

Vi scias tre bone, ke...

Vous n'y êtes pas du tout !

Vi plene miskomprenis !

Tute ne temas pri tio !

Vous pouvez m'en croire !

Tion ĉi kredu al mi !

Vous pouvez vous retirer !

Forpermeson vi nun havas !

Vous pouvez y compter !

Pri tio vi povas esti certa !

Vous rêvez !

Ĉu vi imagas ?

Vous seriez bien gentil de

Estus bele al vi, se ...-us

Vous voulez rire !

Vi ŝercas ?

Vous voyez bien que

Vi konstatas, ĉu ne, ke

Vous y êtes !

Jen vi ĝin havas !

Voyez vous ...

Vidu

Voyons...

Aŭskultu...

Voyons, voyons...

Tt, tt...

Vraiment ?

Ĉu vere ?

Vraisemblablement

Verŝajne

Zut !

Oj !

KIEL REDAKTI LETERON

KIEL KOMENCI :

Estimata Sinjoro,
Cher Monsieur,

C'est avec un réel plaisir que j'ai reçu
votre lettre du 13/1

**Kun vera plezuro mi ricevis vian
leteron de 13/1**

Merci pour votre lettre du... qui a été
la bienvenue

Dankon pro via bonvena letero de...

J'accuse réception de votre lettre

Mi kvitancas la ricevon de via letero

J'ai bien reçu votre lettre

Mi bonorde ricevis vian leteron

De tout coeur, merci !

Plej koran dankon !

ALIAJ ESPRIMOJ :

Par la présente

Per ĉi tiu letero

Aux bons soins de

Pere de

Jusqu'à plus ample informé
Ĝis plua, ekzameno (informiĝo)

A toutes fins utiles
Tiucele

Par retour du courrier
Per revenanta poŝto
Repoŝte

Sans nouvelles de votre part d'ici le 20 ct.
Se mi ne ricevos de vi ian sciigon
ĝis la 20a de ĉi tiu monato

Au plaisir de recevoir bientôt de vos
nouvelles
Ĝis baldaŭa plezura reaŭdo
Ĝis la plezuro baldaŭ aŭdi de vi

Dans l'attente de vos nouvelles
Atendante aŭdi de vi

Dans l'espoir d'
Kun tiu espero, ke

Dans l'espoir que vous me ferez le plaisir
de m'apprendre votre complet rétablis-
sment

**Esperante, ke baldaŭ vi min ĝojigos per
la sciigo, ke via sano absolute kaj plene
reboniĝis 2**

Mon épouse me prie de vous transmettre
ses vœux sincères de prompt et complet
rétablissement

**Mia edzino petas min transsendi al vi
sian sinceran deziron de baldaŭa plena
resaniĝo²**

Je me réjouis d'avance à la pensée...
Mi antaŭĝojas ĉe la penso...

Qu'il me soit permis de... (+ infinitif)
Estu do permesite al mi, ke... -u

Veuillez répondre de suite
Bonvolu respondi senprokraste

KIEL FINI :

Avec vous par la pensée
Enpense kun vi

Avec ma considération distinguée
Altestime

Avec mes remerciements anticipés
Kun antaŭdanko

A vous lire
Ĝis relego / Ĝis la reskribo

Merci d'avance !
Anticipe mi dankas !

Je vous prie d'agréer l'assurance de
Akceptu, mi petas, mian certigon pri

Recevez l'expression de mes sentiments
respectueux

Akceptu miajn respektplenajn salutojn

Cordialement vôtre,
Kore via

Cordiales salutations
Korajn salutojn

Salutations empressées
Servoprete via

Votre dévoué
Sindoneme via

Très amicalement vôtre
Tutamike via

Sincères amitiés
Sincerajn amikaĵojn

Lettre suit
Letere pli

Salutations spécifiquement espérantistes :

Samideane via

Celui qui partage la même idée que vous

Samcele via

Celui qui poursuit le même but

En la sama serio

De la sama aŭtoro :

- * **PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA**
kun aldono : *Esprimoj sankciitaj*
de l' uzado
- * *Aperos en 1987 :*
ESPRIMARO FRANCA-ESPERANTA

De L. Lentaigne :

- * **KIEL DIRI...?** (Praktika Esperanta
Frazologio) 5000 esprimoj.
Internacie uzebla.
- * **TIEL DIRU !...** (5000 expressions)
Franca-Esperanta. Komplemento de
"Kiel diri...?"
- * **ABREGE PRATIQUE de GRAMMAIRE**
ESPERANTO

De F. Baronnet :

* **LINGVAJ ANGULOJ**

kaj cento da verkoj originalaj aŭ traduk-
itaj.

Plena listo kun specimeno de la revuo
"Laŭte!" kontraŭ 1 irpk.

"Laŭte!", F 47340 Laroque Timbaut

Presis : Baudé, 47340 Laroque